

# BRNO

Malgranda gvidilo tra Brno




# Deviga minimumo en Brno: Kion vi en Brno nepre devas?




5 Legoma foirejo

Gustumi veganan glaciaĵon sur la placo plena de agrablaj odoroj el frukta, legoma kaj flora foirejo. → Zelný trh (Legoma foirejo)




3 Burgo Špilberk

Nur iom horori.  
→ burgo Špilberk kun kazematoj ĉirkaŭspinitaj per legendoj



Vilao Tugendhat 6

Admiri funkciismon.  
→ vilao Tugendhat, registrita en la listo de UNESCO



Petrov 2

Miregi.  
→ katedralo sur Petrov kune belvido al la urbo



Placo de Sankta Jakobo

Sidi sur trotuaro ĝis la nokto.  
→ Jakubské náměstí (Placo de Sankta Jakobo)



1 Malnova urbodomo

Havi birdan perspektivon.  
→ panoramo el la turo de la Malnova urbodomo



Statuoj de Brno 4

Demandi, kioma horo estas.  
→ tempomaŝino sur náměstí Svobody (la Placo de la Libereco)



Statuoj de Brno 4

Esplori kaŝitan arton.  
→ statuo Kuraĝo sur Moravské náměstí (la Moravia placo)



## 1 MALNOVA URBODOMO

La plej malnova nereligia konstruaĵo en Brno, kiu ekde la mezo de la 13-a jarcento ĝis 1935 servis kiel sidejo de la urba administrejo.

- \* Malfrugotika portalo kun kurba tureto de Anton Pilgram.

- \* Du simboloj de Brno, remburita krokodilo kiel fama drako de Brno kaj ligna rado, en la volba trapasejo sub la portalo.

- \* Publike alireblaj korto kaj turo de la urbdomo, kun belvida ambita ĉirkaŭpasejo.

→ Turisma informejo TIC BRNO, Radnická 8, [www.ticbrno.cz](http://www.ticbrno.cz)

## 2 PETROV

Nepreterirgardebla dominanto de la urbo leviganta sur la monteto nomata Petrov. Ĝiaj komencoj povas esti trovitaj en la 70-aj jaroj de la 12-a jarcento, kiam en tiu ĉi loko staris romanika rotondo.

- \* Unu gotika kaj du barokaj rekonstruoj de la katedralo. Karakterizaj du turoj de arĥitekto August Kirstein estas rezulto de novgotika rekonstruo el la jaro 1909.

- \* Ĉe la piedo de la monteto Petrov troviĝas Denis-parko kun panoramo de Brno kaj ĉirkaŭaĵo. Dum bona vetero estas videbla eĉ Pálava (protektata montetara regiono).

- \* En la parko estas kolonaro kun fontano kaj obelisko el 1818 gloriganta venkon super Napoleono.

→ Petrov 9, [www.katedrala-petrov.cz](http://www.katedrala-petrov.cz)

## 3 BURGO ŠPILBERK

Vasta burga komplekso el la 13-a jarcento, rekonstruita en la 17-a kaj 18-a jarcentoj al fortega milita citadelo, poste al malliberejo por la plej danĝeraj krimuloj kaj politikaj malliberuloj.

- \* Muregoj kun mirinda elvido al Brno, kaj al la burgo, kie nun troviĝas Muzeo de la urbo Brno, kaj en kies areo okazas koncertoj, teatraj prezentadoj kaj festivaloj.

- \* Sonorilaro konsistanta el dekkvin sonoriloj, belvidejo en angulturo de la burgo, baroka kapelo dediĉita al la Plej Sankta Trinitato.

- \* Kazematoj, obskuraj volbaj koridoroj, en kies spacoj restadis multaj gravaj krimuloj el la tuta habsburga monarkio.

→ Špilberk 1, [www.spilberk.cz](http://www.spilberk.cz)

## 4 STATUOJ DE BRNO

En la centro de Brno troviĝas multaj statuoj, la plej konataj estas tempomaŝino sur la Placo de Libereco kaj statuo Kuraĝo sur la Moravia placo.

- \* Tempomaŝino, ankaŭ konata kiel meĥanika horloĝo, el nigra granito, estis konstruita en la jaro 2010 laŭ la propono de Oldřich Rujbr kaj Petr Kamenik. Ĝia alto estas preskaŭ 6 metroj, per formo ĝi devus elvoki imagon de pafkuglo kaj tiamaniere rememorigi pri la heroo defendo de la urbo kontraŭ svedaj trupoj dum la tridekjara milito

- \* Aŭtoro de la statuo Kuraĝo, instalita en la jaro 2015, estas Jaroslav Róna.

Okmetra bronza statuo reprezentas kavaliron sur ĉevalo kun nekutime longaj kruroj kaj ĝi estas alegorio de kuraĝo.

## 5 LEGOMA FOIREJO

Placo el la 13-a jarcento kun foirejo, fontano, statuaro kaj du teatroj. Ĉi tie, same kiel en pasinteco, vi povas aĉeti freŝajn fruktojn kaj legomojn.

- \* Subtegmenta foirejo kun elvido al la urbo.

- \* Baroka fontano Parnaso de Johann Bernhard Fischer de Erlach.

- \* Palaco Dietrichstein, unu el la plej malnovaj palacaj konstruaĵoj en Brno.

- \* Baroka domo de abatoj el Abatejo de Žďár kaj Palaco de familio Hausperský el Fanal, kie nuntempe estas scenejo de la teatro Husa na provázku

- \* Reduta, unu el la plej malnovaj teatrodomoj en Eŭropo, kie koncertis la dekonunjara Wolfgang Amadeus Mozart.

- \* Labirinto sub la Legoma foirejo, komplikaj mezepokaj koridoroj kaj kelaroj.

## 6 VILAO TUGENDHAT

La plej fama vilao en Brno, dominanta en tiel nomata vilaa kvartalo. Ĉefa funkciisma monumento registrita kiel mondheredaĵo de UNESCO.

- \* La konstruaĵo dezajnita de Ludwig Mies van der Rohe por geedzoj Tugendhat.

- \* Formala arĥitektura pureco plantita en naturan kadron, reciproka interpenetro de spacoj, de teknika kaj struktura solvo, kaj uzo de noblaj materialoj.

- \* Al aliaj famaj vilaoj de Brno apartenas secesia vilao Löw-Beer (Drobného 22), secesia Jurkovič-vilao (Jana Nečase 2) kaj funkciisma vilao Štiassní (Hroznová 14).

→ Černopolní 45, [www.tugendhat.eu](http://www.tugendhat.eu)

## 7 SUBTEREJO DE BRNO

Kvar misteraj promenrondoj sub Brno tra lokoj el diversaj historiaj epokoj.

A Labirinto sub la Legoma foirejo. Zelný trh 21

B Monermajstra kelo Dominikánské nám. 1

C Ostejo ĉe Sankta Jakobo Jakoba placo Jakubské nám.

D Akvokolekto je Flava monto

E Bunkro Denis Husova/ Nádražní



→ [www.brnenske-podzemi.cz](http://www.brnenske-podzemi.cz)

F Kontraŭatoma bunkro 10-Z

→ Husova kontraŭ numero 12, [www.10-z.cz](http://www.10-z.cz)

G Ŝtontemplo - lapidario en renovigitaj akvokolektoj de Špilberk

→ Špilberk 1, [www.spilberk.cz](http://www.spilberk.cz)



## MORAVIA GALERIO EN BRNO

La dua plej granda artmuzeo en Ĉeĥa Respubliko proponanta larĝan spektron de kultura utiligo.

- \* La historio de la galerio etendiĝas ĝis la jaro 1818. Ĝi kunigas la liberan kaj uzeblan arton en daŭraj aŭ provizoraj ekspozicioj.

- \* MG troviĝas en kvar arĥitekture gravaj konstruaĵoj: en Pražák-palaco, en Artmetia Muzeo, en Guberniestra Palaco kaj en Jurkovič-vilao.

+ Pluaj muzeoj kaj galerioj: Muzeo de la urbo Brno, Domo de Artoj, Moravia Landa Muzeo, Teĥnika Muzeo, Fait Gallery, Somerpavilono Letohrádek Mítrovských, Galerio TIC, Mendel-Muzeo, Muzeo de Romaa Kulturo, Dioceza Muzeo kaj aliaj.

## NACIA TEATRO BRNO

Teatro malfermita en 1881 laŭ modelo de Nacia Teatro en Prago.

- \* Dramo, baletoj kaj opero aktivas dum la sezono en 3 konstruaĵoj: Janáček-teatro, Mahen-teatro kaj Teatro Reduta. Somere la teatro transiras al ekstera naturo.

- \* Mahen-teatro – la unua plene elektre lumigita teatro en la Eŭropa kontinento.

- \* En someraj monatoj estas are vizitata parko kun akva kurteno antaŭ la konstruaĵo de Janáček-teatro.

+ Pluaj teatroj kaj Filharmonio: Urba Teatro Brno, Filharmonio Brno, Centro de Eksperimenta Teatro (Teatro HaDivadlo, Teatro Husa na provázku, Teatro U stolu), Teatro de Bolek Polívka.

# Ekster la limoj de la urbocentro

## DIGOLAGO DE BRNO

Populara loko por refreŝiĝo kaj ripozado. Ĝi estas borderita per plaĝoj kun multaj infanludejoj, sportejoj, boatpruntejoj, pedalboatoj kaj padelotabuloj.

- \* En proksimeco troviĝas la burgo Veveří.

→ Ŝiptrafiko: [www.dpmb.cz](http://www.dpmb.cz)  
→ burgo Veveří: [www.hrad-veveri.cz](http://www.hrad-veveri.cz)

## ZOO BRNO

Zooĝardeno funkcias ekde la jaro 1953 en la naturparko Mniši hora (Monaha monto) en Brno-Bystrc.

- \* Ĝi ofertas konatiĝon kun interesaj bestoj el la tuta mondo, nun inter aliaj kun paro da kongaj leonoj.

→ U Zoologické zahrady 46, [www.zoobrno.cz](http://www.zoobrno.cz)

## STELOBSERVEJO KAJ PLANETARIO BRNO

Centro fokusita al popularigado de astronomio kaj aliaj sciencoj.

- \* Antaŭ la stelobservejo vi povas provi eĉ interaktivajn ekspoziciaĵojn, ekzemple kalejdoskopon, pikselan muron, sonotubon aŭ planedan dinamometron.

→ Kraví hora 2, [www.hvezdarna.cz](http://www.hvezdarna.cz)

## VIDA! SCIENCA CENTRO

Distra scienca parko kun daŭra interaktiva ekspozicio por kaj infanoj kaj plenkreskuloj.

- \* Eblo provi veterprognozan anoncadon, propran tornadon aŭ inunodon de vilaĝo.

→ Křížkovského 12, [www.vida.cz](http://www.vida.cz)

# Turisma portalo GotoBRNO.cz

Itineroj, priskribantaj interesajn temojn en Brno, konsiloj, kie bone manĝi kaj trinki, rekomenditaj aranĝoj kaj festivaloj, kiujn preterlasi estus domaĝe. Tia estas GOTOBRNO.CZ. Moderna turisma portalo, danke kiun vi facile trovas en Brno ĉion, kio estas por vi plezura. Plie vi ne perdiĝos en la urbo. Vi legos aktualajn informojn pri la trafiko, pri aliaj presajoj kaj informcentroj. Kaj fine, ĝi rekomendos al vi, sen kiuj dezajnaj donacetoj ne forlasi la urbon Brno.

# Brnopas

La plej bonaj lokoj en Brno en unu turisma karto. [www.brnopas.cz](http://www.brnopas.cz)



Legendo	
	Parkado
	Publikaj necesejoj
	Hospitaloj
	Polico
	Busa stacidomo
	Fervoja stacidomo
	Flughaveno
	Taksio
	Poŝto
	Statuo
	Aĉetcentro

Preĝejoj	
1	Kapucena templo de Vera Kruco
2	Katedralo de Sanktaj Petro kaj Paŭlo
3	Templo de Sankta Miĥaelo
4	Ortodoksa templo de Sankta Venceslao
5	Kirko de Johano Amoso Komenio
6	Templo de Sankta Tomaso
7	Templo de Sankta Jakobo
8	Jezuita templo de ĉieliro de Sankta Maria
9	Templo de Sanktaj Johanoj kun Loreto
10	Templo de Sankta Maria Magdalena
11	Templo de Sankta Jozefo


Ekspoziciejoj	
1	MG: Guberniestra Palaco
2	MG: Pražák-palaco
3	MG: Artmetia Muzeo
4	Muzeo de la urbo Brno
5	Domo de Artoj de Brno (DDAB)
6	Moravia landa muzeo: Dietrichstein-palaco
7	MLM: Mendelianum
8	MLM: Palaco de nobelinoj
9	MLM: Monumento de Leoš Janáček
10	DDAB: Domo de nobeloj el Kuŝtát
11	Fait Gallery
12	Galerio TIC
13	Muzeo de romaa kulturo
14	Muzeo de marionetoj

Ĉiĉeronaj servoj, promenoj laŭ temoj  
 +420 775 891 790  
 pruvodce@ticbrno.cz

Rondpromenoj laŭ temoj troveblas ĉe  
[www.gotobrno.cz](http://www.gotobrno.cz)

Trafiko  
 Transporta entrepreno de la urbo Brno  
[www.dpmb.cz](http://www.dpmb.cz)  
 Serĉado de konektoj  
[www.idos.cz](http://www.idos.cz)

TEATROJ KAJ FILHARMONIO	
1	NTB: Teatro Reduta
2	NTB: Janáček-teatro
3	NTB: Mahen-teatro
4	Urba Teatro Brno
5	Filharmonio Brno
6	CET: Teatro Husa na provázku
7	CET: Teatro U stolu
8	CET: Teatro HaDivadlo
9	Teatro de Bolek Polívka
10	Teatro Na Orli



← Foirejo  
 ← VIDA! scienca centro  
 ← Somerpavilono Mitrovských  
 ← Vilao Stássni

Universitata Hospitalo de Sankta Anna Brno

Čeĉa busa stacidomo Zlínanka  
 Brno Flughaveno

Eldonisto: Statutárni město Brno,  
Dominikánské nám. 196/1, 602 00 Brno

Foto: Pocketmedia, s.r.o. (Monika Hlaváčová, David Tieku), Magistrato de Brno (Marie Schmerková), Pavel Gabzdyl, Vila Tugendhat (arkivo), Jan Brettschneider (SkyPix.cz), Nacia Teatro Brno (arkivo), Moravia Galerio Brno (Kamil Till)

Teksto: TIC BRNO, p.o.

TIC BRNO, p.o. finance subtenas  
statuta urbo Brno.

2018

[www.ticbrno.cz](http://www.ticbrno.cz)

